# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

**Organo de FRANCA LIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ, filio de IKUE**

Redaktoro : S-ro Gaston VERON, pl. de la Petite Bruyère, DOMFRONT (Orne)
Sekretariino : F-ino J. LE BOEDEC, 18, rue Ernest Cresson, PARIS 14 -
Kasisto : S-ro J. LIGOT, 30, rue Fernand Segouin, ARNOUVILLE-LES-GONESSE ( S & O )
C.C.P.- PARIS 51 74 79
Abonnement : 1,75 NF.- Adhésion à la Ligue : 0,75 NF. = Total : 2,50 NF.

N° 54 BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO Julio 1962

Sankta Pio X, preĝu por ni.

Senkulpigo.

Certe vi miras ke tiu bulteno aperas tiel malfrue ! Sed pro gravaj malfacilaĵoj, S-ro Véron devis forlasi la taskon. Estas tre bedaùrinde ĉar de pluraj jaroj li sindoneme kaj kompetente redaktis la bultenon.

Kiu povas anstataùi lin ? - Li promesas kunlaboradon sed ne regule ! - Intertempe, laù decido de la lasta komitat-kunveno, F.K.L. fariĝos simpla informilo kaj ligilo por la membroj de Franca Katolika Ligo Esperantista. Ĝi publikos viajn sugestojn, viajn klopodojn kaj viajn sukcesojn. Do ĝia amplekso kaj intereso dependos de via agemo kaj de viaj rilatoj kun la provizora respondeculino.

Fakte ni ne bezonas beletrajn artikolojn kiujn vi trovos en aliaj esperantaj revuoj. Fariĝu aktivaj membroj de IKUE kaj vi ricevos ĝian organon : ESPERO KATOLIKA. Ekzistas ankaù de Januaro 1962 nova revuo en esperanto : "Nova Civito". Ambaù enhavas interesajn kaj ofte gravajn artikolojn pri la katolika kaj homara vivo. Vi do facile konsentos ke nia bulteno estu nur helpilo por nia agado en la francaj katolikaj medioj.

En la oktobra numero de E.K. vi legos tre aktualan arti-kolon speciale redaktitan por tiu revuo, de la Centro "Unité Chrétienne" de Lyon pri la laboroj faritaj en Francujo por ekumenismo. Tion ni ŝuldas al Grafino de Briey kiu petis ĝin al la direktoro de la Centro.

Pluraj samideanoj preparas por ESPERO KATOLIKA artikolojn rilate la agado de la Francaj Katolikoj en diversaj fakoj kaj medioj. En la venonta bulteno kiu aperos tre baldaù ni pli longe parolos pri tio.

Ni daùrigu kuraĝe kaj restu dankemaj al nia samideano

kiu donis jam tiom da tempo kaj certe ankoraŭ kontribuos al la vigleco de la daŭranta bulteno.

Jeanne Le Boëdec.

=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=

La kotizo por Franca Ligo restas la sama, sed ne forgesu ĝin
Vi povas pagi samtempe :

por Franca Ligo : 2,50 NF.
por E.K.- : 9,75 NF.

ĉu al la kasisto de nia Ligo : S-ro Ligot, 30, rue Fernand Segouin
Arnouville-les-Gonesse (S & O)
C.C.P. PARIS- 51 74 79

ĉu al la reprezentanto de "Espero Katolika" en Francujo :
S-ro Pierre Muffang
14 bis, Avenue Galois
Bourg-la-Reine (Seine)
C.C.P. PARIS 224 82

=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=

Ni ekscíis pri la morto de la edzino de nia samideano kaj samkredanto S-ro MOTILLON el Tours. Ni ne forgesu ilin en niaj preĝoj.

()()()()()()()()()()()

Dépôt légal : 3e trimestre 1962
Papier de presse : No 34.745-

Polycopié par : F.M.C.
Prieuré Saint-Martin
LA HOUSSAYE-EN-BRIE
( Seine-et-Marne )

---

Directeur de la Publication : M. G. Véron à Domfront (Orne)

:::::::::::::::::::::::::::::::::